

La Suda Kruco

Oficiala Órgano de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penco

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 66 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 decembro 1925

CONGRESS AT MONTEVIDEO.

There will be a Congress of Esperantists of South America in January next. The meeting will be held in Montevideo. S-ro Gomez, who is working wholeheartedly to ensure its success, estimates that the congress will be attended by fully 200 Esperantists from the other South American Republics. A post card and other greetings from Australian Esperantists besides being highly prized would be very effective propaganda and would accentuate the "push" s-ro Hudson has given to Esperanto in South America. Address to "S-ro Santiago Gomez, Montevideo, Rio Branco 1341, Uruguay."

NEWS FROM JAPAN.

The Sixth Congress of the Extreme East Tropical Medicine Association was held in Tokio from 11th to 31st October. Reports of the proceedings are not yet available but it was expected that delegates from various parts of Asia, Australia and America would be present. Esperanto is in very great favour with Japanese medical men and two of them, Prof. Ogato and Dr. Murata, were to address the Congress in Esperanto giving the results of their investigations into certain tropical diseases. This being the first international Congress held in Japan, a great effort was to be made

by showing the fitness of Esperanto for such occasions, and so pave the way for its being the official language of the many future international congresses of various organisations which the Japanese are confident will take place in their country.

S-ro K. Oosaka, one of the foremost Esperantists in Japan has been commissioned by this government to proceed to America to make a two years' study of American Railway methods.

PROPAGANDA.

The following is extracted from the leading article in the September issue of "Amerika Esperantisto." Australian conditions are exactly similar to those existing in America and we could say of ourselves just what our American friends have said. The movement would be helped by Australian Esperantists working along the lines recommended by "Amerika Esperantisto."

"AMERICA LAST!

She oughtn't to be there, but that is about where she stands—in the world-wide Esperanto movement today.

Now then why is our ostensibly great country in the rear of the International Language movement? There are several reasons.

In our great one-language stretch of continent, separated by two-oceans from the rest of the world, the language difficulty is less physically obtrusive than in the interjostling Babel elsewhere.

The earlier years of our national Esperanto propaganda proceeded in the wrong directions and appealed to the wrong people. The idealistic side of the movement was overemphasized, the emotions were stirred at the expense of common sense.

Now, editorially speaking, our attitude in the matter of propaganda in this country is based on the ground assumption that Esperanto does not need the United States of America, but that the United States of America needs Esperanto. Esperanto can get along without this country just as the League of Nations gets along without her. Esperanto is an established fact, just as much so as the English language is an established fact. We can correspond, carry on business, or travel almost anywhere on the civilized globe (except U. S. A.) by means of Esperanto alone, right in this present day. That is sufficient so far as American Esperantists are personally concerned. To our mind the *raison d'être* of Amerika Esperantisto and the Esperanto Association of North America is simply that our own fellow countrymen (for their own sakes, mind you, not ours) may enjoy the advantages we ourselves already enjoy to the full, quite the same whether they care to join us or not. We repeat, putting it more broadly, Esperanto does not need the outsider; the outsider needs Esperanto.

This brings us to the question of how best to diffuse the blessings of Esperanto among the benighted public of U.S.A. There is no need to dwell long on the theory of propaganda methods. There seem to be essentially just two ways, safe, sane, but apt to be overlooked on account of their simplicity.

1. Let the language itself be physically in the eyes of the public on all possible occasions, in the form of **Esperanto lessons**. These should be printed in as many monthly, weekly and daily papers and magazines as will let us. People will thus not be learning "about" the language, but

absorbing, even unconsciously, by constantly meeting them, the forms of the language itself. Make it as easy to acquire Esperanto as possible—not asking the outsider to send off and pay for a textbook, but by spreading the lessons upon the printed medium in which he has already invested.

2. Let us urge our foreign friends to do our general proganda for us in this country; for in truth **they alone can**. Tell them to write freely to non-Esperantists in this country, either enclosing *Oefec* keys, or referring to the nearest U. E. A. delegate over here for the translation of such letters and cards. Tell them to flood our country with advertising circulars, booklets and catalogues in their various lines of business. If the American public gets a big enough avalanche of documentary evidence from abroad it will wake up to the status of Esperanto in the world at large. But it will not wake up till that avalanche comes. American Esperantists have wasted too much time theorizing with unitiate fellow countrymen. The only really convincing propaganda comes from abroad, and the best course we can pursue is to stimulate our foreign friends to do our propaganda for us. In the very nature of the case Esperantists can achieve direct practical results only in countries other than their own."

KRONIKO.

MELBURNO, V.—En novembro la debato, kiel kutime, estis por la anoj la plej interesa ero, en la programo de la Melbourne Esperanta Asocio. La elektita temo estis, "Ĉu la virino devus fortranĉi sian hararon?" kaj pro la nova modo inter la virinoj, ĝi donis okazon por tre vigla vortbatalo. La plej multo el la Klubanoj partoprenis, kaj ili esprimis siajn opiniojn klare kaj lerte, sed pro la frua foriro de kelkaj, oni ne decidis, kiu partio gajnis la debaton.

Je la sesa de novembro la anoj ricevis po du versoj el infanejaĵaj rimajoj por traduki en Esperanton, kaj la provo donis amuzon, kaj estis bona ekzerco. Poste s-ino Bigelow afable deklamis kelkajn favoritajn; ekzemple: "Tomaĉjo, Tomaĉjo, fajfistido," "Kien vi iras, bela fraŭlino" kaj aliajn, kiuj tre placis. . . .

LA SUDA KRUCO. MELBURNO.

Monata gazeto pri la Esperanta
Movado.

Ni fosu nian sulkon.

Adresu ĉiujn leterojn, manuskriptojn,
ktp. al "Box 731 F, P.O. Elizabeth
St., Melbourne."

Abonojn oni povas sendi per poŝta
noto en Aŭstralio, per poŝta mandato
el Nov-Zelando kaj el ĉiuj aliaj land-
oj nur per internacia poŝta mandato
aŭ per perfektaj, neuzitaj poŝtmarkoj
de la lando, sendante la plej mal-
multajn pecojn (poŝtmarkojn) ĝis la
necesa sumo. Ni ne donas specimen-
ojn ekzemplerojn, kvankam ni vole
sendos ilin kontraŭ perfekta, neuzita
poŝtmarko, je valoro de kvin pencoj
—duono de unu svisa franko.

RESPONDO AL DEMANDO.

Korespondanto skribis, demandante
kio estas la unua devo de aŭstraliaj
esperantistoj, ĉu subteni la U.E.A.,
ĉu niajn naciajn esperantajn organiz-
aĵojn? Por ĝuste respondi oni devus
rigardi nian movadon kiel vivantan
korpon havantan koron, arteriojn, vej-
nojn, sangon kaj animon. La U.E.A.
similas la koron, la diversaj naciaj
organizaĵoj similas la arteriojn; la
diversaj naciaj grupoj similas la vej-
nojn; la Fundamento de Zamenhof
similas la sangon, kaj sendube la maj-
stro mem ankoraŭ restas kiel la ani-
mo de esperantismo.

Oni facile povas kompreni, ke la
tuto devas funkcii kune; se eĉ unu
parto ĉesus funkcii, kompreneble disi-
ĝo ekkomencus. Por nutri la koron
de nia movado necese estas forte sub-
teni la naciajn organizaĵojn kaj
grupojn, ĉu grandajn, ĉu malgrand-
ajn. Ankaŭ estas devo por ĉiu esper-
antisto subteni la diversajn naciajn
Esperantajn ĵurnalojn kiuj agas kiel
disvastigiloj por Esperanto.

Dum la mondmilito kelkaj nacioj ne
povis daŭrigi la laboron por Esperan-
to. Grupoj kaj organizaĵoj disigi-
gis kaj tuj la U.E.A. sentis tiun okazaĵon,
la nombro da anoj ĉiam pli kaj pli
malgrandiĝis. Sed post la mondmilito
la diversaj naciaj organizaĵoj denove
komencis funkcii kaj tuj la U.E.A. re-
ciproke sentis tion. Sufiĉe dirite.

EL LETEROJ DE VOJAĜANTA AŬSTRALIANO.

Kara amiko,

La ŝipo "Chicago Maru" restis ĉe
Rio de Janeiro, iom pli ol du tagojn,
kaj mi uzis ĉiujn eblajn minutojn por
travagi la belegan urbon kaj alrigar-
di la belegan havenon, kaj ĉar mi
ĉiam promenadis, kune kun du aliaj
pasaĝeroj, mi ne trovis oportunan
okazon por viziti la samideanojn. Mi
jam antaŭe skribis al la Rio delegito,
sed, ĉar la dato de la alveno de ŝipo
estis tre necerta, mi ne surpriziĝis,
ke li ne venis al la kajo por renkon-
ti min.

Ĉe Santos la ŝipo restis preskaŭ tri
tagojn, kaj unu el la tagoj ni vojaĝis
60 mejlojn al San Paulo, urbo kun pli
ol miliono da loĝantaroj. Alveninte
Buenos Aires, mi vane klopodis trovi
la Esperantan grupon, kiu, laŭ la jar-
libro, kunvenas ĉiun tagon. Mi poste
sciigis, ke tiu grupo ne plu ekzistas.
Mi skribis al s-ro Gomez, la delegito,
kaj la sekvantan matenon li vizitis
min ĉe la hotelo. Li estas tre afabla
homo, kaj jam multe gvidis kaj help-
is min. S-ro Gomez montris al mi,
kie nun kunvenadas la sola grupo en
Buenos Aires, kaj mi vizitis tiun
grupon. Tie mi renkontis 20 sami-
deanojn, kiuj tre afable akceptis min,
kaj pro mia ĉeesto la kunveno daŭris
ĝis la 12a p.t.m. La sekvantan tagon,
la vic-delegito, s-ro Villafranca, venis
al la hotelo je la 9a horo matene kaj
ni kune faris tre longan ekskurson
tra la urbo. Por fari tion, ni veturis
per tramoj, subtera tramo, elektrava-
gonaro, omnibusoj kaj aŭtomobiloj.
Ni ankaŭ vizitis la ĉevalkurejon, kie
ni vidis du kurojn kaj amasegon da
homoj; poste ni vizitis la agrikultur-
an ekspozicion, kaj kiam mallumiĝis
vizitis muzikan societon, kie oni hore
kantadas, kaj fine dancadis ĝis la
deka horo, kaj post tiu horo mi ves-
permanĝis ĉe s-ro Villafranca, kaj
fine atingis mian hotelon meznokte.
Multaj plezuroj por unu tago, ĉu ne?
Mi jam restis en Buenos Aires ok
tagojn, kaj restos ankoraŭ du, kaj
dimanĉe venonta mi komencos la
vojaĝon al la akvofalegoj Iguazu,
kiuj estas pli altaj ol tiuj de Niagara
kaj pli larĝaj ol tiuj de Victoria. La
Iguazu faloj estas 65 metroj altaj kaj
3500 metroj larĝaj, kaj por atingi

Iguazu mi devos vojaĝadi dum kvar tagoj per tri rivervaporsipoj. Revenante mi vizitos Asuncion, la ĉefurbon de Paraguay; tiu ĉi flankvojaĝo okupos eble du semajnojn. Kiam mi estos reveninta al Buenos Aires mi vizitos Montevideo'n kaj poste el Buenos Aires iros al Valparaíso kaj vizitos multajn urbojn antaŭ ol mi atingos la urbon, Panama. Mi eble alvenos al Wellington, Noy-Zelando, je la 14 decembro. Ĝis nun mi multe ĝuis la vojaĝadon, precipe la viziton al Buenos Aires, kie la samideanoj estas tiel afablaj. Pro la ĉeesto de nia Reĝido, Buenos Aires estas gaja loko, kie troviĝas multaj vizitantoj. Hodiaŭ (3/9/25) mi denove renkontis s-ron Gomez kaj li helpis min aĉeti vojaĝbiletojn por mia ekskurso al Iguazu, ĉar ĉe la oficejo neniu parolas angle.

Sur la ŝipo Bruselas, 16 septembro — El Buenos Aires mi veturis per ŝipo, (9 horojn), al Montevideo. Tie mi renkontis la delegiton, s-ron Pedro Casas, la eks-delegiton, s-ron M. Fernandez, kaj multajn aliajn afablajn samideanojn. Inter aliaj s-ro Santiago Gomez multe helpis kaj gvidis min. S-ro Fernandez prezentis min al s-ro Henriko Munoz, riĉa homo kiu loĝas en palaco, kaj mi ankaŭ vizitis s-ron Munoz ĉe lia hejmo, kie ni babiladis, trinkis teon kaj aranĝis fari ekskurson en la morgaŭa tago. Tion ni faris. Ni vizitis la belan marbordon kaj poste la nove konstruitan parlamentejon, kiu kostis du milionojn da funtoj sterlingaj. Estis nur per la helpo de s-ro Munoz, ke mi povis viziti tiun marmoran palacan konstruaĵon, ĉar la sola tago por vizitantoj estas dimanĉo, kaj mi ne volis resti tiel longe en Montevideo, kiu estas nur malgranda urbo kaj mi, en la kvar tagoj dum kiuj mi restis tie, dank'al la Esperantistoj, vidis ĉion, kio estas vizitinda. Ĝus kiam mi skribis la lastan vorton de la lasta frazo, mi preskaŭ estis ĵetita al la planko, ĉar la ŝipo dum ĝi rapide iris en la mallumo, frapis la fundon de la rivero, kie la akvo ne estas sufiĉe profunda. Nun oni laboras por liberigi la ŝipon, kiu ne estas difektita. Hodiaŭ matene okazis same kaj oni bezonis duonon da horo por liberigi la ŝipon. Mi lasos la maristoj zorgi pri la ŝipo. Estas tiel mallume, ke mi nenion povas vidi, ne eĉ la riverbor-

dojn kaj mi daŭrigos la leteron, ĉar se ni estos bonŝancaj, en la morgaŭa mateno ni atingos Paraguay'on, kaj tie mi volas enpoŝtigi tiun ĉi leteron. Nun, denove, la ŝipo antaŭen iras; ni restis sur la riverfundo nur dudek minutojn. Nun mi estas survoje al Asuncion, la ĉefurbo de Paraguay. Ni vojaĝas per padelsipo havanta ĉirkaŭ la saman grandon kiel la "Ozone," (Havena ŝipo ĉe Melburno. Red.) kaj ni devas vojaĝi dum kvar tagoj por atingi Asuncion, kiu, sekve de la multaj kurbigoj de la rivero, estas malproksima de naŭcentmejlaj vojaĝo de la marbordo. Unue ni estis sur la rivero Rio de la Plata, kies buŝo estas 180 mejlojn larĝa, poste ni laŭiris la Rio Parana, alian grandan riveron, nun ni estas sur la Rio de Paraguay, kaj morgaŭ matene mi atingos Asuncion. La ŝipo restos tie tri tagojn kaj la revena vojaĝo al Buenos Aires okupos tri tagojn plu. La reveno estos pli rapida pro la forta fluo de la riveroj. Kiam mi lasis Buenos Aires estis malvarme. Ni ĉiam vojaĝas norden, kaj jam nun ni estas en la tropikoj, kaj estas varme; palmoj kaj bananarboj kreskas sur la insuloj kaj la riverbordo, kaj troviĝas en la rivero multaj aligatoj. Hodiaŭ mi vidis kelkdekojn, kelkaj el ili almenaŭ dekkvin futojn longaj! Troviĝas en Asuncion nur unu samideano kaj li estas ankoraŭ lernanto. S-ro Gomez, ĉe Montevideo, donis al mi lian adreson kaj, skribinte al li, mi esperas renkonti lin. Sur la ŝipo neniu povas paroli angle tial mi estis muta dum la lastaj tri tagoj. Salutojn al vi, ankaŭ bonvole saluti la grupanojn en mia nomo. Fidele via Percy T. B. Hudson.

Nuntempe, kiam ĉiu posedas kaj uzas fontanplumon, estas utile scii kie oni povas sendi sian difektitan plumon kun plena certeco, ke ĝi estos rebonigita de fidinda specialisto. Tia specialisto estas nia samideano, s-ro Harold Pudney, al kies reklamo aperanta sur alia paĝo ni petas la atenton de tiuj legantoj, kiuj bezonas riparojn al siaj fontanplumoj aŭ intencas aĉeti novajn.

RECENZOJ.

ESPERANTA LEGOLIBRO, B kaj E. Migliorini. A Paolet, eldonanto, S. Vito al Tagliamento, Italujo. Prezo, lire 5, (Proksimume 1 ŝ. angla)

Jen libro, kiun oni povas kore rekomendi. En 142 paĝoj troviĝas: Unua parto—Tra la vivo,—simplaj frazoj, proverboj, historioj, anekdotoj, legendoj, diversaĵoj; Dua parto—Tra la lingvo—enhavas tre valorajn konsilojn pri Esperantaj vortoj pri stilo kaj kiel akiri bonan stilon. La tria parto—Tra la Literaturo—estas riĉa je prozo kaj verso. Gesinjoroj Migliorini meritas laŭdon pro sia bona komprenemo de temoj kiuj estas la plej taŭgaj kunmeti en unu legolibro. (C.W.B.)

VI SOLA ESPERANTO, povas fari tiajn miraklojn! Unuakta originala teatraĵo. Premiita ĉe la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj. Arturo Ghez. A. Paolet, eldonanto, S. Vito al Tagliamento. Prezo Liro 1½, (proksimume 4 anglaj pencej).

Amuza farso en ses scenoj. La roloj estas por kvin personoj; tri viroj kaj du virinoj. (C.W.B.)

LA BATALO DE FLOROJ EN VALENCIO.

La Batal' komenciĝas. La popol' entuziasme al la ĝoj' sin donas Ĉie lum' kaj koloro kaj petol', en kiujn arde la popolo dronas.

Pasas kaleŝoj en triumfa bel' kun virinoj ridantaj per rigard' Kaj la floroj flugante sub ĉiel' vizagojn celas kun kisanta ard'.

La Batalo finiĝas, mortas jam. Sed ankoraŭ ĉe l' floroj estas am', gajec' en la rigard' ĝoj en la kor!

Estas ĉiu virin' — parfuma, bela Malsupre, tere, estas flodorod'; supre, ĉiele, estas brilo stela.

Miquel Duran I Tortajada.

El la kataluna lingvo tradukis,
Jaume Grau Casas.

Premiitaj dum la lastaj Internaciaj Floraj Ludoj en Palma de Mallorca.

—(La. Suno Hispana)

ESPERANTO EN LA SERVO DE NOVAJ ELTROVOJ.

Estus interese, se alilandanoj publikigus novajn eltrovojn de ĝenerala intereso en la Esp.-gazetaro. Per tio oni pruvus la utilon de Esperanto kaj ĝian disvastigon tra la mondo.

Ĉar multaj geesperantistoj amatoresin okupas pri la fotografado, en la intereso de nia propagando estas utile atentigi ilin pri nova eltrovo.

Tiuj, kiuj uzadas platajn filmojn, bone scias, ke tro ofte la negativoj estas malbonigitaj de lumstrioj aŭ lumfasko, ĉar la lumo iel penetris en unu el la anguloj aŭ flankoj de la kartona filmskatoleto, spertuloj ofte serĉis rimedon por eviti tion, sed vane ĝis lastatempe kiam s-ro Boogert, el Hago, konstruis novan modelon, kiu garantias, ke tiu maloportunaĵo ne povas okazi.

Anstataŭ ĉe la flanko, kiel ordinare, oni tiras la impresigitan filmon el la mezo de la filmujo, kie troviĝas fendeto. La fizika principo estas, ke la lumradioj neniam faras du angulojn. Rimarkinde ankaŭ estas, ke oni povas eligi kiun ajn impresigitan filmon por aperigi la bildon, ne elprenante la skatoleton el la ujo.

Pri la nova eltrovo, kiu estas patentita en ĉiuj landoj, la asocio Anonima "Nebo," Laan van Neerdersvoort 18 en Hago (Nederlando) volonte donas informojn. La pakitaj filmoj estas haveblaj pere de fotografaj magazenoj.

RADIO-DISAŬDIGO PRI ESPERANTO.

La 30-an de Aŭgusto s-ro Ĉikao Fujisaŝa, Prof. de Kiuŝiu Imperia Universitato, faris paroladon propagandan pri Esperanto ĉe l'radistacio J.O.A.K. en Tokio je 13. 30h. Tio estas la unua parolado pri Esperanto, disaŭdigita de J.O.A.K. kaj la elokventa parolo tre influis sur ĉiujn aŭskultantojn.

Ĉi tiu stacio estas iufoje aŭdate en Aŭstralio, sed malfeliĉe la sukcesintaj aŭskultantoj ne estas Esperantistoj. J.O.A.K. estas la unua fremlanda stacio, kiun oni bone aŭdis en Aŭstralio kaj certe devus influĝi la lokajn radianojn, instigante ilin lerni la lingvon de la amatoro-radiano Esperanto.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata Amiko,

Unu el miaj samklubanoj s-ro "Ho Bo" bohvolas anstataŭigi min sendante al vi, en formo de letero, la sekvantaj faktojn pri la "Frua His-
torio pri Aŭstralio."

Aŭstralio estis eltrovita de Sipestro Cook dum 1770. Tiam nur m-
deĝenaj nigruloj loĝis vagade en la lando, plejparte ili estis sovaĝuloj. Sipestro Cook ne restis longe ĉe la nova kontinento.

En 1788 alvenis kelkaj ŝipoj el Anglujo, alportante 1024 pionirojn, kaj kapitano Phillips por la Brita Imperio laŭforme aneksis la landon je 26 Januaro tiun jaron. Oni starigis kolonion ĉe Sidnejo. Pli poste franca navigacianto—Laperouse—elŝipigis ĉe la golfo "Botany," apud Sidnejo. La pioniroj ekkomencis kulturigi la teron, semis tritikon kaj hordeon, ankaŭ plantis vinberojn. Dum la sekvanta somero oni rikoltis la unuan rikolton. Post du jaroj, alvenis dua ŝiparo el Anglujo kun roto da soldatoj kaj kelkaj civilaj pasaĝeroj. Dum 1792 la unua fremda komerca ŝipo alvenis el Anglujo, kaj tiutempe la enloĝantoj havis la nombron de 4203 homoj. En 1793 la unua preĝejo estis konstruita en Sidnejo. 1795 oni starigis la unuan pres-maŝinon. 1796 estis konstruita la unua teatro, ankaŭ ĉe "Newcastle"—norda urbeto apud la marbordo—oni eltrovis karbon.

1797. Kelkaj progesemuloj importis merinosajn ŝafojn el suda Afriko.

1800. La nombro de la enloĝantoj pligrandigis ĝis 5995 personoj.

1801. Oni fabrikis la unuan litkovrilon el lano kaj ankaŭ tolaĵon.

1802. Vojaĝantoj eltrovis golfojn ĉe suda Aŭstralio kiujn oni nomis "Spencers" kaj sankta "Vincent," ankaŭ oni eltrovis du havenojn ĉe Kvinslando nome "Curtis" kaj "Bowen."

1803. Saf-bredantoj, ekkomencis la

eksportadon de ŝaflano. La unua ĵurnalo—"La Sidneja Gazeto"—estis eldonita.

1810. Oni malfermis la unuan poŝto-
oficejon—en Sidnejo.

1817. La unua monbanko estis konstruita. Balen-kaptistoj kaj ŝafbredistoj bonege prosperis.

1819. Estis malfermita la unua ŝtata ŝpar-banko.

1823. Oni eltrovis oron en Nova Sud-Kimrujo.

1827. Kupro estis eltrovita apud la haveno "Macquarie."

1829. Starigis kolonio ĉe "Swan" rivero en okcidenta aŭstralio.

1830. Batalo okazis inter la blankuloj kaj la indiĝenaj nigruloj.

1831. La registaro vendis parcelojn da tero per publika aŭkcio. La unua vaporsipo—"Sophia Jane"—alvenis el anglujo. Oni eksportis karbon el la regiono "Newcastle" en Nova Sud-Kimrujo.

1835. Fondis Melbourne, John Pascoe Fawkner.

1838. La unua Melburna tagĵurnalo estis eldonita Misiistoj germanaj fondis mision ĉe Brisbano.

1839. Esplorantoj eltrovis multe da fruktodonaĵoj terregionoj.

1841. Nov-zelando apartigis sin de Aŭstralio.

1845. Multaj esplorantoj vojaĝis tra la kontinento kaj eltrovis ĉiajn mineralojn ankaŭ riverojn, montojn kaj kulturigeblajn regionojn.

1846. Romkatolikaj misiistoj fondis novan mision ĉe "Perth" en okcidenta aŭstralio.

1847. Oni starigis ferfandojn en Nova Sud-Kimrujo.

1848. En Okcidenta Aŭstralio esploranto eltrovis kupron kaj plumbon. Esploranto Leich-hardt pereis dum li elserĉis kvinslandon.

1850. Oni komencis konstrui la unuan fervojon en Sidnejo.

Bonega resumo de niaj fruaj tagoj, ĉu ne? Amike via

KARLO MADRIGALO.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson.

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LA NAIVA MALJUNULO.

"Edzino," diris la maljunulo, "Estas nun la tempo por pagi la luprezon. Kiom da funtoj ni havas en la domo?"

Estas la kvardek funtoj kiuj ni ŝparis por pagi la luprezon de la pasinta duonjaro, kaj tio kuŝas sub la ŝtono en la kamero; en la poŝo de mia plej bona preĝejo estas kvin ŝilingoj kaj tri penceoj; estas deknaŭ ŝilingoj kaj kvin penceoj enmetita en la truon de la kamertubo; estas unu penco kion mi trovis sur la vojo kiam mi hejmeniris de la foiro; estas dedek funtoj kaj unu ŝilingo kaj kvar penceoj, kiu ni ricevis por la butero kaj ovo; estas la mono ricevita por la lano de la ŝafoj, tio ĉi kuŝas sub fasko de fojno en angulo de la stalo de maljuna Tib, pro timo, ke ŝtelistoj neatendite vizitos nin. Tio ne estas ĉio, ĉar sub la kapa finaĵo de la lito en la okcidenta ĉambro estas kesto, kaj en la kesto estas ligna sitelo, kaj en la sitelo vi trovos ses funtojn kaj deknaŭ ŝilingojn kaj dek penceojn, kaj sub la antaŭa sojlo

Sed la naiva maljunulo aspektis konfuzite kaj komencis skui la kapon kaj froti la okulojn. "Edzino," li diris, "Ĉu vi ne povas kunmeti ĝin kaj amasigi ĝin, kaj min diri, ĝi estas tute ĝusta." Tiam, mi selos maljuna Tibon kaj iros al la luiganto, mi diros "Jen estas la kvardek funtoj por la pasinta duonjaro, kaj jen estas la kvardek funtoj por tiu ĉi duonjaro. Mi ne estas klerulo sed mia edzino certigas, ke ĉio estas tute ĝusta." "Mi ja pensas" respondis la edzino, iom akre, "ke estos pli bone se mi surrajdos maljunan Tibon kaj iros mem." "Vi tion farus, mi volas vi tion farus," diris la naiva maljunulo, humile. "Ĉiam mi estas timema, ke mi perdos iom de la mono." "Ne, mi ne iros," diris lia edzino, "Kio utilo estas havi viron, se li ne povas fari tion, kion vi diras al li?" Tial, la naiva maljunulo suriris maljunan Tibon, kaj rajdis el la pordego.

"Nun, se vi renkontos ŝteliston survoje, memoru diri al li, ke vi iras pagi la luiganton, kaj ke vi havas okdek funtojn en via leda selo." "Vi estas tiel naiva, ke mi vere kredas tio estas ĝuste kion vi ja farus," ŝi diris al si, brufermante la pordon. Dum li trotetis sur la ĉefvojo, renkontis lin

belega sinjoro, rajdanta sur nobla nigra ĉevalo, havanta argentajn ornamajojn sur sia selo, kaj belan nigran saketon ornamitan per argento ĉe la anguloj. "Bonan matenon," diris la belega sinjoro. La naiva maljunulo respondis humile, "Bonan matenon, kaj mi respektplene dankas vin, sinjoro, pro tio, ke vi parolas tiel amike al tiel simpla maljunulo, kiel mi estas."

Ĝis kie vi iras," demandis la belega sinjoro. La maljunulo ridetis kaj respondis tre malhumile por tiel humila maljunulo, "Mi iras pagi mian luprezon, sinjoro. Estas nur du mejloj malproksime, sinjoro, kie loĝas mia luiganto. Ni ne pagis lin la pasintan duonjaron, sed, sinjoro, tio ja ne estis mia kulpo ĉar li estis for de sia hejmo." "Kaj tial, vi pagos lin nun ĉu ne?" demandis la belega sinjoro.

(Daŭrigotá.)

DEATH OF S-ro. SILBERNIK.

S-ro Joseph Silbernik, for many years chief delegate of U.E.A. in New York, died there on 30th August. S-ro Silbernik was a brother of the late S-ro Zamenhof. During recent years his health has not been good and in spite of medical warning he attended the Geneva Congress at which he was anxious to meet his nieces, the daughters of D-ro Zamenhof. His death occurred three days after his return to America. S-ro Silbernik was one of the most active Esperantists in North America and his death will be greatly deplored.

RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 30th November the following sums were received (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made).—A. W. Bassett, 4/6 (9/25); J. Parker, 4/6 (11/26); Persista Grupo, 5/6 (6/26); W. R. Browning, 10/- (11/26); Edith Anderson, 4/6 (11/26); M. C. Trundle, 4/6 (12/26) and donation, 3/8; F. Tondut, 4/6 (6/26); G. D. Nash, 9/- (1/26); A. H. McPhie, 13/6 (7/26); P. Leahy, 4/6 (7/26); C. Unyin, 6/3 (7/25); J. Scurrie, 10/- (3/26); M. Purnell, 4/6 (12/26); G. Redfern, 10/- (6/27); A. A. Kelley, 4/6 (10/26); Pyke's Book Shop, 12/- (10/25); sundries, 3d., 7d., 2d., 1/-.

OUR SUPPORTERS.

S-ro Maŭrico Hyde, Rabaul, skribas — "Ĉiunonate mi avide legas "La Suda Kruc" -n. Ĉi tie mi, kiel multaj aliaj izolitoj, sentas la valoron de la gazeto."

S-ino A. H. McPhie, Cleve, S.A., writes: "I wish the 'Suda Kruc' every success."

Miss M. C. Trundle, Eumundie, Queensland, writes: "The little magazine comes most regularly. It is a great help to the solitary student, and it is of international value also. It deserves better support."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ci tiu adreso — "La Suda Kruc," Box 731 F, P.O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia": — Amikeco, 10; Austria Esperantisto, 8/9; Arbeiter Esperantisten, 6; Amerika Esperantisto, 5; Esperantista Junularo, 29/30; Heroldo de Esperanto, 73 ĝis 78; La Suno Hispana, 101; Le Monde Esperantiste, 140; La Ridanta Esperantisto, (Elze, Hanover, Bahnhofstr 24a) Jaro 1, numero 1; La Revuo Orienta, 10; Nova Sento, (Gokurakĝunaĉi 32, Fukuoda, Japan) 4.

Kvankam "La Suda Kruc" estas regule elsendata, ĝi ne, en la lasta tempo, ricevis ekzemplerojn de Brazila Esperantisto, Holanda Esperantisto; Homeco; Hungara Esperanto; Literatura Mondo; Novaj Tempoj; Sennacieca Revuo; Radio de Filintern; Arguso; La Policisto; Esperantio; La Progreso. Ĉu la koncernataj gazetoj bonvolos kontroli siajn sendlistojn?

S-ro K. A. Susuki, P.O. Box 79, Orange, Texas, Usono, deziras korespondadi per PI kun ĉiuj landoj. Tuj respondos.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send, for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.